NIA VOĈO
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4º.28012 Madrid
(91) 530 87 98 persone lunde vespere
aliajn tagojn, aŭtomata respondilo
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz
MAJO 1997

## NEKROLOGO

De nove ni devas komenci nian bultenon pere de malbona novaĵo, en tiu-ĉi okazo estas la forpaso, la 7-an de aprilo, de **Georgette Lelievre Paris**, la plej maljuna membro de MEL (89 jaroj) kvankam ŝia vigleco kaj dediĉo al nia movado daŭris ĝis la lastaj momentoj de ŝia vivo. ŝi esperantiĝis en nia Liceo kie aktive laboradis kiel publikaj rilatoj. ŝi organizis la unuajn kursojn en la Centro Cultural Maestro Alonso kaj en diversaj paroĥaj centroj de la kvartalo Moralataz kie estis konata pro ŝia disvastigado de esperanto. Pace ripozu

## VORTARO SOPENA

Eble kiel omaĝo al José Climent, helpanto por la Sopena-poŝvortaro, kiu forpasis la pasintan 5-an de aŭgusto, estis reeldonita la plej fama vortaro de la hispana lingvo. Jam troviĝas ĉe librovendejoj pri lingvoj kaj kompreneble ĉe HEF-libroservo. Vendo-prezo: 900 ESP.
*Bedaŭrinde M. G. Adúriz ne realigis akurate sian promeson: skribi, surbaze al vortarego de De Diego, novan hispana-esperanto poŝ-vortaro en unu jaro. La teksto de Lexicón Sopena ne estis reviziita ne aktualigita.*

*HEF ANGULO*

**Perkoresponda Kurso de Esperanto**
*Atentu!*
**Lanĉ-oferto nur ĝis la 31a de majo 1997**
**9.900 ptoj**
**Poste la prezo de la kurso estos 14.900 ptoj**
**La kurso konsistas el kasedo, lernolibro, poŝvortaro, informlibro, pli ol 200-paĝa ekzercaro. kaj la gvido de kompetenta profesoro.**

FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Estrarkunsido 97-04-12: Oni rekonsideris (denove) la planatan **eldonon de hispanlingva broŝuro**. Studinte diversajn buĝetojn, la definitiva decido estis eldoni 5.000 ekzemplerojn, je proksimuma kosto de 400.000 ESP. Aliaj traktitaj temoj: Eventuala decido de UEA pri nova landa asocio en Hispanio (Kataluna E-Asocio). Renoviĝo de la estraro

## HISPANIO

En la Instituto Juana de Castilla de **Madrid** , prelegis Luis Ojer pri "Esperanto, internacia lingvo". Pli ol 20 personoj ĉeestis kaj vidis la videon "Esperanto". Post la prelego sekvis interesa parol-rondo


La eŭroparlamentano José Mª Gil Robles sendis al S-ro Pirlot, kunordiganto de Eŭropa agado, leteron favorantan la uzon de Esperanto: "*Mi konsentas kun vi pri la avantaĝoj kiujn Esperanto alportas al universala lingva kompreniĝo, tamen mi opinias ke ĝiajn disvastigon kaj konon malfaciligas la fakton ke ĝi ne estas lingvo nature naskiĝinta el la popolo, transdonata de gepatroj al gefiloj. [...] Esperanto povas esti mirinda kompletigo al la kono de diversaj lingvoj, sed hodiaŭ ĝi kapablas anstataŭi neniun el ili. Malgraŭ tio, mi kuraĝigas vin al ĝia disvastigo, kaj mi fidas ke, en ne tro malproksima estonteco, la homaro alvenos al la sole dezirinda lingva kompreniĝo*

Post plurmonata "bombado" pere de "Astro Jupiter" ene de la CD "Esperanto", hispanaj radiostacioj rekomencis la kampanjon per la kanto "Tirano". Jen kovrilo de la "re-miksita" varianto, reklamcele dissendita de la eldoninto, Warner Music Spain

## ESPERANTO EN AMAS-KOMUNIKILOJ

Ekde **Granado**, José Matos sendis novaĵon pri ĵurnal-kurso de esperanto. Ĝi aperas en la revuo "El cocodrilo" de CCOO-poŝt-kaj-telegrafista sindikato de Granado.

## EKSTERLANDE




| ABONTARIFO 1997 | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Aŭstralio | 28 dolaroj | Britio | 15 pundoj | Germanio | 34 markoj | Japanio | 2600 enoj | Portugalio | 2400 eskudoj |
| Aŭstrio | 240 ŝilingoj | Ĉeĥio | 350 kronoj | Hispanio | 2100 pesetoj | Kanado | 29 dolaroj | Rusio | 20 guldenoj |
| Belgio | 700 frankoj | Danio | 130 kronoj | Hungario | 1750 forintoj | Nederlando | 38 guldenoj | Svedio | 150 kronoj |
| Brazilo | 20 guldenoj | Finnlando | 100 markoj | Israelo | 29 guldenoj | Norvegio | 140 kronoj | Svislando | 28 frankoj |
| | | Francio | 120 frankoj | Italio | 31000 liroj | Pollando | 20 guldenoj | Usono | 22 dolaroj |

A. Casquero kiel hispana delegito de Monda Turismo, partoprenis en la Generala Asembleo en Pollando.

La revuo "Kontakto" anoncas kolektivan abonon pere de bela fotografaĵo de Marcos Cruz

Laŭ statistiko de UEA Hispanio havas, en du kategorioj, 629 membroj. La totalo de membroj de UEA estas 20.591

## GIAN CARLO FIGHIERA JUBILEAS

Nia kara samideano festas en 1997 la 50-an jaron de sia agado por esperanto. Ni deziras al li feliĉan jubileon kaj ni dankas lian dediĉon al Madrida Esperanto Liceo dum lia laboro en Madrido kune kun lia edzino Ada Sikorska.

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Ĉiu-lunde ni kunvenas, ekde la 18,30 horo, ĉe MEL, Atocha 98-4°

**Prelegoj:** 19,30 horo en Atocha 98-4°

19-an majo "La plej bona reformo de la *esperantiko* estas ĝia eksterliturgia uzado". M. Casanoves

## VALENCIAJ KONGRESOJ

La Reĝino Sofia akceptis la Honoran Presidantecon de la 7-a Internacia Esperanto-Kongreso (8-a/13-a julio). Tio signifas morala oficiala apogo de la Hispana Reĝa Familio al nia movado, kaj agnosko de la streboj de la esperantistaro por atingi mondon pli pacan kaj fratecan.

## KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

28-a Kataluna kaj 1-a Transpirenea Kongreso de Esperanto. 1-4 de majo. Figueres
49-a Kongreso de Internacia Fervojista E-Federacio. 10-17 majo 1997. Košice, Slovakio
3-a Europ-Unia E-Kongreso. 16-19 majo 1997. Stutgarto (Germanio)
7-a Internacia Kongreso de Monda Turismo. Valencio (Hispanio) 8-13 julio.
**56-a HISPANA ESPERANTO KONGRESO. Valencia (Hispanio) 8-13 julio**

## *KOTIZO POR 1997*

***La kotizo por ĉiu-ĉi jaro estas sama ol la lastaj kvin jaroj. Bv. se vi ankoraŭ ne abonis ĝin sendi ĉekon po 2.000 PTA. je la nomo de ESPERANTO-LICEO DE MADRID. Antaŭ-dankon pro via kontribuo al daŭrigado de MEL.*** Pro la altiĝo de la procento pagenda al banko NI PETAS AL MEMBROJ KIUJ PAGIS PER BANKO KE ILI PAGU PER ĈEKO ***Vi povas pagi rekte ĉe la Liceo (lunde vespere).***

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Atocha 98-4°
28012 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal

# 7-a INTERNACIA ESPERANTO-KONGRESO
# PROVIZORA PROGRAMO

**************

MARDO, 8-A DE JULIO

---

10.00 øis 15.00, kaj 15.00 øis 19.00. Disdonado de la kongresa dokumentaro.
*11.00 Malfermo de "LIBROSERVO"*
11.00 Malfermo de la "FILATELA EKSPOSICIO"
11.30 Estrar-kunveno de Hispana Esperanto-Federacio
12.30 Gazetara konferenco
14.00 Manøo-paýzo
*16.00 Cseh-kurso*
16.00 Estrar-kunveno de "MONDA TURISMO"
17.00 Eýropa Esperanto-Forumo. 1-a Prelego
*18.30 Interkona Vespero*
21.00 Arta Vespero

MERKREDO, 9-A DE JULIO

---

09.00 Malfermo de "LIBROSERVO"
10.00 Solena Inaýguro de la Kongreso
12.00 Cseh-kurso
12.00 Prelego 2: "Sur la spuroj de Federico García Lorca", far Miguel Fernández
*14.00 Manøo-pauzo*
16.00 Publika kunsido de akademianoj de Esperanto
17.30 Prezentado de "Novaj Libroj"
17.30 Kunveno de la partoprenontoj en la "Pilgrimado al Santiago de Compostela" kaj al la *Postkongresoj*
19.00 Ronda Tablo de la Eýropa Esperanto-Forumo
21.00 Teatro en Esperanto

JAÝDO, 10-A DE JULIO

---

09.00 Eliro de la dumkongresaj ekskursoj
09.00 Malfermo de "LIBROSERVO"
*10.00 Prelego 3 de la Forumo*
12.00 Cseh-kurso
13.00 Akcepto æe la Urbodomo por la delegitoj.
*14.00 Manøo-paýzo*
16.00 Publika kunveno de membroj de AIS
17.00 Øenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio
17.00 Urba perpieda trarigardado
19.00 Internacia Arta Vespero 1
*22.00 Nokta perpieda rigardado de la urbo*

VENDREDO, 11-A DE JULIO

---

*09.00 Eliro de la dumkongresaj ekskursoj*
09.00 Malfermo de "LIBROSERVO"
10.00 Cseh-kurso
*10.00 Internaciaj Ekzamenoj de Esperanto*
12.00 Prelego pri Esperanto por ne-esperantistoj
14.00 Manøo-paýzo
16.00 Prelego 4 de la Forumo
17.30 Filmo en Esperanto
*17.30 Kunveno de "MONDA TURISMO"*

19.00 Internacia Arta Vespero 2
21.00 Kongresa Vespermanøo
Sabato, 12a de julio
*09.00 Eliro de la dumkongresaj ekskursoj*
09.00 Malfermo de "LIBROSERVO"
09.30 Prezentado de venontaj E-kongresoj (inter ili UK-oj de Adelaido kaj Montpellier)
09.30 Cseh-kurso
10.00 Prelego 5 de la Forumo
... SABATO, 12-A DE JULIO

12.00 Literatura grupo "IBERE LIBERE". Speciala programero
*14.00 Manøo-payzo*
16.00 Prelego 6 de la Forumo
18.00 Solena Fermo de la Kongreso
18.00 Fermo de la Filatela Eksposicio
20.00 Hispana Arta Vespero

DIMANÆO, 13-A DE JULIO

09.00 Eliro de la dumkongresaj ekskursoj
*10.00 Ferma Prelego. Omaøoj.*
12.00 Granda Arta Festivalo
14.30 Komuna Adiaŷa Tagmanøo
*17.00 Adiaŷo*

Lundo, 14a de julio
Eliro de la Postkongresaj Ekskursoj, kaj de la Pilgrimado

GRAVA
ATINGO
DE LKK

La Regxino Sofia de Hispanio akceptis la Honoran Prezidantecon de la "7-a Internacia Esperanto- Kongreso", kiu okazos en Valencia (Hispanio), inter la 8-a kaj la 13-a de julio 1997.
Tio signifas morala oficiala apogo de la Hispana Regxa Familio al nia movado, kaj agnosko de la streboj de la esperantistaro por atingi mondon pli paca kaj frateca.

Solvo por la participa problemo.

La verba konjugacio estas mirinda kreaĵo de Zamenhof kaj permesas per simplaj rimedoj nuanci la tempojn de la esperantaj verboj ekde la antaŭpasinto ĝis la postfuturo sen iu ajn problemo nek escepto.

La pasivigo de la frazoj estas ankaŭ tre facila, "mi fermis la pordon" estas pasive "la pordo estas fermita de mi", kies signifo estas ekzakte la sama, kaj estas uzata ekde Zamenhof ĝis hodiaŭ, tute laŭ la 6ª regulo de la fundamento.

Bedaŭrinde oni uzas la finaĵo -ita por montri nunan rezulton, forgesante ke -it-, laŭ la 6ª regulo, signifas estinta tempo, ĉu estu uzata kun verba, adjektiva aŭ adverba senco, kaj ke la adjektiva uzo de -ita montras pasintan rezulton kiu povas daŭri aŭ ŝanĝi dum la tempo kiu pasis ekde la fino de la ago ĝis nun.

Tial la uzo de -ita por montri nunan rezulton nur povas esti tolerebla kiam estas uzata kun verboj kies rezulto ne povas ŝanĝi, kiel skribi, rompi, mortigi, ktp., sed ne kun verboj kies rezulto povas ŝanĝi, kiel fermi-malfermi, varmigi-malvarmigi, ŝalti-malŝalti kaj ĝenerale ĉiuj kiuj havas aŭ povas havi la prefikson mal- , kaj tiuj kiel konstrui, detrui, rekonstrui, ktp. kies rezulto povas esti ŝanĝita per posta ago.

Feliĉe, esperanto havas multajn rimedojn ne esploritaj, kiel la subfikso -ad-, kiu kun la finaĵo -o estas uzata por substantivigi verbojn kaj kun la finaĵo -a povas adjektivigi verbojn, kiu estas ĝuste kion mi bezonas, verban adjektivon, kiu ne havas tempon.

Tia uzo estas ege simpla, kaj tute konforma kun la fundamento, ĉar nur bezonas uzi -ada por montri rezulton kaj uzi -ita por montri agon.

Jen ekzemploj: "La pordo estas fermita (pasinta ago)". "La pordo estas fermada (nuna rezulto)". "La pordo estis fermita (antaŭpasinta ago )." . "La pordo estis fermada (pasinta rezulto)". "La kafo estas varmigita (pasinta ago)". "La kafo estas- aŭ ne estas -varmada (nuna rezulto)". "Vundita (kiu ricevis vundon)". "Vundada (kiu havas vundon - rezulto)". "Kiam mi alvenis, la fiŝo estis manĝita (antaŭpasinta ago)". "Kiam mi alvenis, la fiŝo estis manĝada (pasinta rezulto)". La subfiksoj -iĝ- kaj -ig-, kiel ne interesas al la rezulto, oni povas ne uzi. Varmigita kaj varmiĝita havas la saman rezulton: Varmada.

La pasivigo de "Mi fermis la pordon" kiel "La pordo estis fermita de mi" (itista skolo), aŭ kiel "La pordo estis fermata de mi" (atista skolo), feliĉe preskaŭ ne konataj de la esperantistoj, estas ambaŭ malbona solvo, ĉar estas malogikaj, kontrafundamentaj kaj unu el ili ne permesas la uzon de la pluskvamperfekto kaj la alia de la imperfekto. La intenco de ambaŭ skoloj estas bona, sed la rezultoj estas malbonaj.

Mi deziras kaj esperas ke ambaŭ skoloj aceptu la proponitan solvon, kiu estas pli logika, simpla kaj tute konforma kun la fundamento, kaj tiel malaperu la nunaj skismoj, kaj frate kaj amike ambaŭ laboru kune por la bono de esperanto.

Juan Navareño

Juan Navareño
Argumosa, 24
E-28012 Madrid
(Hispanio)